Unue li parolis pri la homara neceso de interkompreniĝo geste, desegne. Sed parole? Li rakontis plurajn proprajn anekdotojn en fremdaj landoj. Tiam la kvindekda geĉeestantoj, ofte vojaĝinte tra la mondo, konfesis sian neeblecon komprenigi sin sen interpretisto, en multaj landoj, kies lingvon oni ne konas aŭ malbone parolas.

Post aludo al la "Babela Turo", simbolo de konfuzo, la preleganto rapide elvokis la historion de diversaj lingvoj de post la bibliaj tempoj ĝis la nunaj.

Aktuale oni rekomendas lerni duan lingvon sed kiun lingvon elekti? Helpa, neŭtrala, simpla, internacia lingvo ekzistas: "Esperanto", kies "Fundamento"-n Dro Zamenhof liveris en 1887 kun ebleco de evoluo sub la akademia egido.

Jen, sur tabulon, la esperanta alfabeto estis skribita kaj pravigita: malapero de ne necesaj literoj kaj apero de novaj literoj por emisii sonojn el aliaj lingvoj.

S-ro Bénazet prezentis la unuajn regulojn kaj la afiksojn, tiamaniere transformante la aŭs-kultantaron en sciavidan klason.

Per tri frazoj entenantaj esperantajn vortojn devenintajn de la angla, germana aŭ latina lingvoj, li montris la internaciecon de la lingvo. Laŭ sia scipovo pri tiuj lingvoj, ĉiu ĉeestanto provis traduki kaj miris.

Li ankaŭ parolis pri la internaciaj, naciaj, regionaj aŭ lokaj asocioj kaj pri la multaj kongresoj. Li aludis al la altradukitaj libroj, al la esperante skribitaj libroj, al la jarlibro, al la esperantaj gazetoj, kies ekzempleroj jam cirkulis de mano al mano.

Dum unu horo kaj duono li interesis la ĉeestantaron, kiu poste demandis:

"En kiu lando estas plej multaj Esperantistoj?", "Kion vi povas diri pri Esperanto kaj la Germanoj dum la monda milito?", "Kial du internaciaj asocioj?", "Ĉu vi pensas esperante?"

Al tiu demando respondis Alice Payret: "Kiam mi iras en Hungarion por viziti miajn amikojn, pro nekono de la alia lingvo mi nur povas paroli esperante. Do, dek tagojn mi pensas Esperante S-ro Benazet rimarkigis, ke korespondantoj ofte fariĝas amikoj.

Je la fino de la kunveno, dudek kvin "Unuaj rendevuoj", entuziasme petataj de la geĉeestantoj estis disdonitaj.

Por konkludi: estis bonega prelego sed, bedaŭrinde, pro la horo (15a h) ne ĉeestis gejunuloj.

Raportis J. Manguine

La 25an de Novembro 1991 naskiĝis ĉe Gesinjoroj Berthonneau

Rahel.

Gratulojn al la ĝojantaj gepatroj

kaj feliĉan vivon al la filineto!

Radio Polonia sendos salutojn al nia federacio en la nomo de S-ro Staszewski (li vizitis nian regionon en Junio 91) je la 20a de Januaro 92. La programo nomiĝas "Koncerto kun bondeziroj" kaj okazas je 21h30 (laŭ la universala tempo/ondolongoj: 41,49,50,200m)

Se vi volas saluti amikojn per la sama senpaga servo, petu mendilon de SFS kaj sendu ĝin 2-3 monatojn antaŭ la dezirata dato de la elsendo.

Radio Polonia elsendas trifoje ĉiun tagon: 15h30, 17h30 kaj 21h30

NIMBUSO: 2 busetoj estas kompletaj por la kongreso de Verona (entute 18 personoj).

Se pliaj personoj interesiĝas, eblus rezervi pli grandan buson.


Kontakti S-inon Gausøen (Tel. 66 81 14 94)

Arriège

Abundas la informoj (malfrue) ricevitaj de tiu departemento. Pro tio necesas resumi. E°-kursoj okazas nun en Verniolle, Arrout, Laroque d'Olmes, Montbel kaj Limoux (11). Tritaga ekspozicio okazis oktobre en Castillon.

"Tutpirenea E°-floro trejni en Peyriac (11) la 13/15ajn de Decembro. Ekspozicio+debato okazis komence de Januaro en Saverdun. Fine de Marto dum la jubilea festo de Laroka MJC oni prezentos la E°-floretan kaj laŭeble ludos E-teatraĵon. De la 13a ĝis la 26a de Julio infanoj biciklos tra Arjeĝo.

Arjeĝo fariĝis modela departemento, ĉu ne? Se vi ŝatas kanti aŭ skiadi, baldaŭ estos ebleco en "La Freychède". Antaŭdankas Jorgos pro via subteno kaj partopreno.



Esperanto-staĝo pri ĥoro kaj skiado

De la 23a de februaro ĝis la 1a de marto 1992 okazos Esperanto-staĝo pri ĥoro kaj skiado en sudokcidenta Francio. La ĥoran parton gvidos Saskia Idzerda, la prezidantino de TEJO. Loko estas La Freychede, F-09 300 Montferrier.

Junaj esperantistoj amase venu por pluvigli la lokan esperantistaron, kiu laŭ informoj de Jorgos jam 40-obligis en unu jaro kaj duono. Petu informojn de: Jorgos, F-09 120 St. Felix de Rt. (Tel. 61-60-86-83)

Vi povas peti aliĝilon de Jorgos aŭ de SFS.

La aliĝkotoj plialtiĝos la 11an de Februaro; ĝis tiu dato la kotoj estas 275F aŭ 200F (15/26 jarulo aŭ 2a de aliĝanta familio), aŭ 120F (ĝis 15j. aŭ 3a de sama familio).

Aldoniĝas la restad-kotoj.

Avignon

La 8a Rodana Rendevuo en Oktobro kunigis 31 personojn. Nikolin' kantis kaj kantigis. La venonta Rodana Rendevuo okazos en Carpentras, organizota de Marie Hunninck.

Dum la Zamenhof-tago en Decembro M.DUC GONINAZ prelegis pri "Esperantismo kaj Politiko: la lecionoj de "la danĝera lingvo"" kaj S.Humm pri "Tritiko kaj pano ĉe la Romianoj"

Provenco

Du eventoj estas menciindaj.

Perfektiga staĝo okazos en Istres la 28an kaj 29an de Marto.

Informas S-ino Ravenstein 13, Av. de Delphes 13006 Marseille

91-79-29-51

La Federacia Kongreso okazos la 23an kaj 24an de Majo en Marseille.

Toulouse

Dimanĉon la 15an de Decembro okazis en Tuluzo la Zamenhofa festo de la loka klubo. Ni, el Perpinjano, estis invititaj kaj partoprenis en tiu renkontiĝo. Dum la tagmanĝo en la hotelo "Mercure" ĉeestis ĉirkaŭ dudek personoj, ĝenerale Tuluzanoj krom du el Cahors kaj alia el Montauban.

Posttagmeze S-ro Albault prelegis; S-inoj Albault kantis, akompanataj de la Pola violonisto Wlodarsky, kiu ankaŭ ludis plurajn pecojn. S-ro Cathala prezentis kun nova lernantino amuzan sceneton. Fine per diapozitivaj, kiujn bonege komentis S-ro Issert, ni revivis la vojaĝadon tra Norvegio okaze de la U.K.

Raportis A.P.+J.M.

ALVOKO de EUROKKA

Dum Pasko 92 okazos en Artigues apud Bordojo la Sat-Amikara kongreso. Eurokka kunorganizos E°-rok-koncerton kun la "Rozmariaj Beboj" el Tuluzo kaj Solo el Malago (Hispanio). "Solo" koncertos la 18an de Aprilo 92.

Dum unu semajno antaŭ tiu dato ni deziras starigi turneton de Solo.

"Solo" estas unu muzikisto-kantisto (Eduardo Vargas), kiu ludas per sinteziloj. Lia muziko situas inter moderna kaj klasika muziko, ĝi ne estas roko sed aktualas pro modernaj sonoj. Solo jam eldonis diskegon kun la helpo de la Malaga E°-asocio (50F). La kondiĉoj estas: gastigado de unu persono + 1000 F. Pri la teknikaj specifikoj, sufiĉas kontakti Eurokka 31450 Donneville, tel. 61.81.95.65.

"Rok-Gazet'" n° 3 aperos en Januaro (abono: 100F por 4 numeroj. Subteno ege bezonata!) Petu la kased/disk-distribuan Katalogon de Vinilkosmo kaj pliriĉigu vian E°-kultur-trezoron

Kongreso de Artigues: Temo: De Mozart ĝis Eurokka/Muziko kaj Esperanto

Komplikeco de du internaciaj lingvoj.

En la kultura programo: impona infanĥoro; Saskia Veen (harpo). E. Hoepelman (tenoro) Eŭska kabareto; gaskona balo, Rok-koncerto ktp

*

Vi legos/is aliloke
pri tiu kongreso, kiun
partoprenis Perpinjanoj
kaj W. Luttermann.

"Gajnis la premion "Ama-
-rilido" moderna fablo
pri korvo kaj vulpo.
Simple sciu, ke temas
pri petrola kompanio
kaj likvaĵo fuela...

ALVOKO al CIUJ :

La Kataluna E^o-asocio
lanĉas kampanjon por
instigi la komisionon
de la Eŭropaj komunumoj
adopti Esperanton kiel
uzotan sendiskriminacian
lingvon.

Ne plu eblas malŝpari
tiom da egaj sumoj por
tradukado al tiom da
lingvoj. Venis la momen-
-to akcepti la solan
neŭtralan lingvon : E^o.

Tial ni petas vian kunla-
-boron al la kampanjo

NEĜBULO kaj LUPEO

per jenaj agoj:

1^o) Vi sendu skriban peton
al la Prezidanto de la
Eŭropaj Komunumoj, Sro
J. Delors en Parlement
Européen 2929 Luxembourg,
laŭ la jena konciza
teksto:

"Sinjoro Prezidanto,

Mi (aŭ ni) petas, ke la Eŭropaj Institucioj uzu la neŭtralan lingvon : ESPERANTO.


Danke kaj respektoplene salutas vin," aŭ io simila

2^o) Vi kopiu tiun alvokon kaj sendu ĝin almenaŭ al du aliaj homoj, kun peto, ke ili faru samon.
Tiel ni atingos la tiel diritajn "Efiko Neĝbulo" kaj "Efiko Lupeo" (Neĝbulo fariĝos nia
kampanjo, se ni sukcesas multajn homojn konvinki al kunlaborado kaj Lupeo pro la koncentriĝo
de tiu forto sur unu sola homo).

Ni ne perdu la nunan oportunan okazon, kiam la Eŭropaj Institucioj firmiĝas kaj pretas
akcepti aliajn landojn !

*

Bildkarto kaj afiŝo estas eldonitaj de la barcelona turisma oficejo, en kiuj la frazo
"Barcelono estas via" aperas en 35 diversaj lingvoj inkluzive de Esperanto.
Mendi ĉe : Patronat de Turisme, Passeig de Garcia 35, E-08007 Barcelona



KEA estos la oficiala re-
-prezentanto por la rilatoj
en E^o dum la Olimpikaj Ludoj.
Gi devas disponigi 10 volon-
-tulajn interpretistojn, kiuj
bone parolu Esperanton kaj
se eble ankaŭ aliajn lingvojn.
Interesatoj sin turnu al KEA.

CULTURA

Mañana se clausura el 25 Congreso Catalán de esperanto

Unos 150 participantes toman parte en las jornadas sobre la lengua internacional inventada por el Doctor Zamenhof, a quien Tarragona dedicó una calle.

Bonvenaj es el saludo de bienvenida con que el alcalde Nadal abre el *Kongreslibro* o libro del 25 Congreso Catalán de Esperanto, que se está celebrando durante este fin de semana en la ciudad. Con éste, Tarragona habrá albergado durante este siglo a tres congresos de esperanto. Uno de ellos, el Congreso Internacional de jóvenes esperantistas, dio nombre en 1968 a la calle Doctor Zamenhof, en recuerdo al creador de la lengua internacional.

El otro fue el Congreso Catalán del 1911, el segundo certamen regional convocado este siglo, con lo cual la ciudad se reveló como una de las pioneras de Catalunya.

Significativamente, el Congreso anterior a éste se celebró en Perpinyà en 1989, y el siguiente se prevé que se realice en las Baleares, siguiendo criterios más lingüísticos que políticos.

Esperantistas

El mérito de mantener vivo el interés por el esperanto en la ciudad, corresponde a José María Serrano i Subietas, presidente del congreso, y organizador de unos cursos de tres meses que se ofrecen anualmente en la Universidad.

Serrano es un políglota nato que se inició en el estudio de la lengua internacional a los 14 años.

El grupo de acción en la ciudad, el *Esperanto-Centro Tarragona*, está integrado por unos 20 estudiantes que se comunican con los otros comités locales a través del *Kataluna Esperantisto*, el órgano de expresión de la *Asociació Catalana d'Esperanto*,



En el centro, el belga Hektor Alòs, que disertó sobre el esperanto y el turismo

o *Kataluna Esperanto-Asocio*, redactado íntegramente en esa lengua. Otra publicación especializada dentro del ámbito catalán, es *Freqüències*, boletín trimestral de información, opinión y debate de la *Juventut Catalana d'Esperanto* o *Kataluna Esperanto-Junularo*. Esta revista, redactada en catalán, basa su contenido en artículos sobre los países del Este.

Los congresistas, que se reúnen en la Universidad, en el *Antic Ajuntament*, y en el *Bar Quet* de la calle Gasòmetre, son

unos 150, en su mayoría catalanes, con las destacadas excepciones de asistentes escoceses, croatas, portugueses, franceses, belgas o lituanos.

Algunos de ellos se dedican profesionalmente a temas lingüísticos, pero otros ejercen profesiones muy distintas. Las edades de los participantes oscilan entre los veinticinco y los setenta años, y la imagen de algunos de ellos coincide perfectamente con la del erudito excéntrico de lengua barba. José María Serrano piensa que «el esperanto es la

mejor alternativa al inglés como lengua internacional, porque es fácil de aprender y neutral. No se extiende por intereses económicos, ni imperialistas, ni pretende eliminar a las lenguas minoritarias, como en ocasiones se ha dado con el inglés. Nuestro lema sería: cada uno con su lengua y el esperanto para todos. Cuando en una reunión internacional se habla inglés, los nativos se encuentran en situación preferente, con el esperanto todos estarían en igualdad de condiciones».

Diccionari de mila mots

- Lo primièr diccionari ambe las definicions en occitan.
- Lo primièr diccionari occitan-catalan.
- Lo primièr diccionari occitan-esperanto.
- Data de sortida : començament de 1992.
- Prètz : mens de cent francs.

Demanda d'informacion

A enviar a : Jacme Taupiac - La Piboleta - Sant Marçal - 82000 Montalban - Occitania - Republica francesa.

(Kunlaboris P. Janton)

La legantoj skribas

12

Sro Boré sendis foton pri la II5a ZEO inaŭgurita dum la tago de la migrêmo en Laroque d'Olmes (21 IX)

S-ino L. Marin sciigas, ke gejunuloj povos vojaĝi malmultekoste inter Parizo kaj Montrealo por la Tejo-kongreso. Necesas frue rilati al Office Franco-québécois pour la Jeunesse

5, Rue Logelbach 75017 Paris (1 47 66 04 76)

Ankaŭ eblas kontakti la Tejo-respondeculon Carine Rose 1, Rue Paul Sautai 80000 Amiens



Espéranto

Pour faire connaître la langue universelle Espéranto, la Jefe, association des jeunes espérantistes français, diffuse une pile HyperCard. Celle-ci (actuellement en anglais) sera bientôt disponible en français contre un chèque de 40 F à l'ordre de Jefe. C.G.

Jefe, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris.

Mac

**EŬROPA KUNIĜO
KAJ NACIISMOJ**

De la 15-a ĝis la 21-a de Aprilo, 1992
La Salle (Aosta), Nordokcidenta Italio

Itala Esperantista Junularo
16a Internacia Junulara Festivalo

Tiu bele afrankita koverto kaj la akompananta letero estos la viaj, se vi konsentas korespondi kun Semjon.

Li estas 14jara kaj loĝas en Siberio.

Lia lasta frazo: "Mi tre ege atendas vian respondon!". Rapide petu la adreson de SFS!

Minitelo: Se vi ne sukcesis per 3615 E°, provu 36 14 Ping*Esperanto!
Informoj ankaŭ haveblas tel. 1.48.87.07.42

Sro Lecroisey registris kasedon kun radio-interparoladoj kaj povas disponigi ĝin al interesatoj.

"Midi Libre" aperigis leterojn de legantoj.

Iuj parolis favore pri la angla, iuj malfavore. Du leteroj estis pri E° (tekstoj en la venonta SFS). Se vi skribos al ML, atentu, ke via letero estu konciza; se ne, vi eble ne plu rekonos vian tekston!

Kiu asertis, ke la Angloj ne favoras la Eŭropan komunumon?

En la apuda artikolo, Deputito N. Tebbit, eks-prezidanto de la partio de M. Thatcher en la Parlamentejo diras, ke li favoras pli profundajn rilatojn inter la Eŭropaj popoloj, sed ke Eŭropo (ili havos komunan lingvon... ekzistos nur kiam)

Li ne mencias, la elektitan lingvon! (Newsweek).

En la sama magazino, ĵurnalistino klarigas, ke en Vatikano "la latina lingvo fariĝis" (tiel komplika por la novaj generacioj) "kiel la greka". Kiu proponis la latinan kiel lingvon por Eŭropo?

Alia gazet-artikolo aperinta en Millau. Legu la titolon! Gi estas tre longa sed vidu la konkludon. La aŭtoro ne troigas; ŝajne la Ministro favoras la anglan, kaj opinias, ke ĝi sufiĉos. J. Delors asertis, ke je la komenco de la 21a jarcento estos 20 aŭ 25 landoj en la Eŭropa komunumo. Ĉu ne estas la taŭga momento por enkonduki Esperanton?

Interland: ni atente sekvas tiun aferon, pri kiu vi certe aŭdis aŭ legis. Espereble baldaŭ solviĝos la problemoj.

Same ni rilatas kun la aŭtoro de la teksto pri E° en la suplemento de la Enciklopedio "Clartés". Ni raportos venontfoje.

Ankaŭ venontfoje aperos la kontribuoj, kiuj ne povas aperi ĉi-foje pro spaco-manko (ni jam aldonis 2 paĝojn!): poemoj, raporto pri vojaĝo al Rumanio kaj Bulgario, ktp. Ni pardonpetas de tiuj gesamideanoj kaj dankas.

*

Europeans have shed a lot of blood in the name of nationalism in the 20th century. Aren't those rivalries best buried by deeper EC ties?

I entirely agree that is the best way. But I take the view that until we have a Europe which shares language and thereby can develop Europeanwide political parties and Europeanwide interests—not just among the elite but among the ordinary people—that it's best that those ties are strengthened on the basis of the national governments. People

Tribune libre

L'enseignement des langues à reculons

Jacques Cohen, agrégé de l'Université, s'inquiète, à l'heure de Maastricht, de projets de réformes « inconséquentes »

« Ainsi donc, d'une part on préconise, à juste titre, l'apprentissage le plus précoce possible des langues dès la maternelle et le primaire, et, d'autre part, on veut le supprimer en classe de 4e pour ne le commencer éventuellement qu'en classe de seconde.

« D'une part, on signe à Maastricht le renforcement de la construction européenne, et, d'autre part, cette même Europe que l'on appelle de ses vœux, on s'ingénie à la détruire au quotidien dans nos lycées et collèges.

ML 17/12/91

Vilhelmo Lutermano:
Iom pri la literatura staĝo dum la Seta Internacia Semajno, septembro 1991

Danjelo Mûarando: Murdo en Esperantujo

Parto dua

Ne mirige do, ke svarmas francismoj kaj aliaj etnismoj, kiuj estas kutime kaj eufemisme nomataj «neologismoj», do «vortoj novaj», sed kiuj ja tute ne estas novaj, sed male, el praaj lingvoj, kaj enkondukitaj kaj funkciantaj laŭ ties praa kaj faosa sistemo. Gramatikuloj nomas tian vorton simple «barbarismo» - jen ekzemploj:

«licea» (gimnazia), kolazono, cenaklo, bruski, vodevila, momenton de febleco, morna (por preme maĝoĵa), apartamento, ktp; sed tiel li ne nur enkondukas fremdajn vortojn, sed ankaŭ etnajn sencojn en Esperantaj radikojn: buroo (en la senco de oficejo, ne PIVasence) gaja «kiel fringo» (ĝi estu prefere alaŭdo), «ke ŝi ricevas» (anstataŭ akceptadas aŭ gastigadas), kolegio (mezgrada lernejo), ekzakte (kie devus esti «precize»), li petis sian konton (la sumon pagendan, la fakturon, en gastejo), komfortigi («ŝi venis por komfortigi min»; instaligis, pelmelo (ĉu pelota melo aŭ melo por pelli?), asidue, «kantino de la policejo» (ĉu ina kanto?), floro sofistika (almenaŭ kun klariga piednoto), ringo sufiĉe leĝera, leĝere kisis lin (supraĵe, tuŝe, malforte), en lozan ĉinan ĉemizon, pli morozan mienon, ktp.

Ni konstatis onomatopeajn mispaŝojn: Li «knalis» per marteletto sur la tablosupro; sed «knali» onomatopeas bruon elvikipigitan, ne elmarteligitan. Pli ĝuste do estus «klaklis».

Kiel kelkaj SATanoj li facilanime detruas la tabelvort-sistemon uzante «alies» anstataŭ «alies» aŭ «aliula»; «ali-» estas ja simpla radiko, kiun iuj konfuzas kun «ai-», kies senco estas tute alia. Kiu diras «alies», tiu ja ne volas komprenigi «alies», sed ĝuste tion li faras.

ŝajnas, ke li sekvas ĉiujn lingvajn fuŝaĵojn, kiujn PIV registras, ekzemple: «Estiel virino» estas alia perforto de la

tabelvort-sistemo (tamen ekzistas «es-tante» (kun la sama nombro da silaboj), kaj ofertas sin ankaŭ la bela tabelvorto «kia», do: «kia virino», kvankam la uzo tiusenca estas nekutima.

Li uzas diversajn formojn de la sama -neoficiala - radiko: «apreci, aprezi» estas ja paŝaĵo de la franca vorto kun du sencoj («kompetente taksii» kaj «alte taksii; ŝati»). Se oni nepre bezonas tiun radikon, tiam oni atentnu, ke la substantiva formo «apreco» estas eco de apro! Uzante barbarismojn, oni atentnu la sekvojn.

Oni povas sin demandi, ĉu la prefiksigo de sufikso vere utilas. «-et» modifas la sencan de la antaŭa radiko. Sed nia aŭtoro ne volas diri «ŝtelisteto», ĉar tio estus malgranda, mallonga ŝtelisto. Li celas iun, kiu kutime faras nur ŝtelojn. Do, kial ne «ŝtelisto»? Sed DM preferas «etŝtelisto».

Kampe de la tempouzo li evidente trovas la simplajn formojn pli belaj ol la kompleksajn (kvankam ili ja estas malprecizaj kompare kun la kompleksaj). Nu, tio estas persona gusto, kaj en E-o oni havas ja ne nur la rajton, sed ankaŭ la eblecon esprimi sin kaj precize kaj malprecize - oni povas elekti, kaj ne ĉiam oni bezonas precizecon. Sed nia aŭtoro uzas la simplajn formojn ankaŭ tie, kie li nepre devus signi la celatan antaŭtempecon. Kompreneble, inteligenta leganto kapablas analizi la temposistemon kaj trovi mem la ĝustan tempon. Sed se aŭtoro agas tiel, kial li tiam ne simple uzu nur la infinitivon, tiam inteligenta leganto povus ja ankaŭ analizi kaj mem trovi.

Kutime la «simplumuloj» defendas sian simplan formon per la uzo de «jam». Ekzemple DM: «ŝi jam formetis la mantelon...» Sed ili eraras pensante, ke «jam» konstituas antaŭtempecon. Tiu frazo povas signifi: 1. «ŝi jam estis formetanta la m.» aŭ 2. «ŝi jam estis formetinta la m.» (Krome, kvankam ne en la tiulibra kunteksto, ĝi povas ankaŭ signifi: 3. «ŝi estas jam formetinta la m.») - La dua senco estis de DM celata, kaj tie, kiel en svarmantaj similaj kazoj, la uzo de la simpla formo ĝenas

la legadon, ĉar ĝi sugestas intersekvajn agojn laŭ la disvolviĝanta preparolata tempo (laŭ la sistemo: «Mi vekigis, ellitigis, lavis min, preparis la matenmanĝon kaj manĝis» - do tio estas intersekvo ne libere ŝanĝebla, ankaŭ ne per «jam», sed nur per kompleksaj tempoformoj).

Kiel multaj Francoj, DM donas al la E-a «vi» etnolingvan, francan sencan, uzante «vi», kie Franco diras «vous» kaj «ci», kie tiu diras «tu, toi» (al si mem kaj al amatino). Farante tion, oni konsciu, ke per la uzo de «ci» oni ŝanĝas la sencan de «vi», kiu en oficiala E-o ja kovras ambaŭ sencojn, kiel la angla «you».

Ankaŭ tiu libro montras, ke eĉ sperta gramatikisto ne havas senmankan ŝirmon kontraŭ simplaj gramatikaj eraroj: «ĉu mi rajtas entrudi en vian laboron?» (devus esti: entrudiĝi).

Lia uzo de la akuzativo en «...li prenis ankoraŭ iom da fruktojn» estas nekutima, sed logika, ĉar la rekta objekto ja ne manifestiĝas en «iom da», kaj la fruktoj ja estas vere la objekto.

Inter multaj aliaj renkontitaj lingvaj problemoj mi fine menciu la faoson de la propraj nomoj. Nur esceptokaze li Esperantigis iun, ebligante ĝian uzon adjektivan, adverban kaj, precipe, akuzativan (ekz-e «Malkomon». Sed «...kiam ni transloĝiĝis en Rumsheim» postulus tiusenca celakuzativon, kiun oni kompreneble ĉe tiaj etnismoj ne disponas. Cetere nur la du ĉeestantaj germanoj kapablis ĝuste prononci la loknomojn (kiuj estas preskaŭ ĉiuj germanlingvaj - ĉu alzacaj?). Ĉe la aliaj oni konstatis tiom da malsamaj prononcadoj kiom da legantoj.

Leginte tiun duan parton, ne pensu ke temas pri libro eble ne leginda: Por ekvilibrigi vian impreson, prefere legu la komencon de la unua parto (p.8 en la lasta numero de nia bulteno). Dankon.

* La Esperantistaro funebras: *
* la 20an de Decembro forpasis *
* en Parizo *
* Profesoro Gaston Waringhien. *

Post la Kultura Festivalo de Parizo :

Du teatraĵoj, tri varieteoj, ekspozicio de gluitaĵoj, forumo pri beletro, libroservo arigis plurajn centojn da spektantoj por la 7a kultura E^o-festivalo. Dum la varieteoj kantis Jak Le Puil (Francio), Kuffo (Zairio), Mikaelo Bronstein (Sovetunio) sed ankaŭ Andreo kaj Natacha (Letonio) kaj Eruda (Ĉinio). Ankaŭ menciindas Rita kaj Franz-Georg Rössler, kiuj prezentis la historion de la fluto, ludante pecojn de muziko de la Renesanca periodo ĝis nun. Elstaris la grupo "Rozmariaj Beboj" el Tuluzo, kiu entuziasmigis ĉiujn per diverslingvaj kantoj. France-E^o lanĉis je tiu okazo la trivoluman Francan Antologion. Temas pri tute escepta kolekto (350F+sendokostoj), ĉar ne temas pri eltiraĵoj sed pri plenaj verkoj.

Vortaro "français-espéranto" : vi povas rezervigi vian ekzempleron ĉe UFE. Ne sendu monon nun. Post ricevo de informilo, sendonte la duonon de la prezo, vi profitos 10% rabaton (eĉ pli) kaj vi ricevos la vortaron antaŭ la oficiala surmarketigo. La definitiva prezo estos inter 300 kaj 400 F (formato A5:14x21cm, pli ol 1000 paĝoj kun du kolumnoj)

Lastminute ni ricevis interesan broŝuron de la "Radikala Partio", kiu volas konstrui transnacion kaj transpartian ŝerton". En la artikolo pri komunikado oni povas legi la jenon: "Preter la antaŭjuĝoj, valoro solvo, rilate demokratian rajton, estas Esperanto". Ni pli detale raportos en la venonta n^o.



Distra paĝo

KRUCVORTOJ



I										
II										
III										
IV										
V										
VI										
VII										
VIII										
IX										
X										
	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10

HORIZONTALE

VERTIKALE

- I) Ĉiesulin(o).
- II) Frukt(o) / Artikolo.
- III) Litero / r : Antimono / r : Musego.
- IV) r : Dekalkulota pezo / Maldekstren rapid(i).
- V) Plori aŭ ridi.
- VI) r : Glisila flugmaniero / Febriga metalo.
- VII) Postlasi.
- VIII) Sciencia sufikso / Konjunkcio / r : Double nefinita.
- IX) s : Daŭra sono / Marbird(o).
- X) Y. Montand en filmo (1960).

r : returnite
s : sone

- 1) Kelkfoje sed mise, ŝovinism(o).
- 2) Senorda naĝbarelo / r : Malel(e).
- 3) s : Metaloido / r : Malalta seĝo / s : La horizontale lasta, ekzemple.
- 4) Li vendas jam uzitan paperon.
- 5) r : Estigi / Greka litero.
- 6) Litero / Montra adverbo / s : Terura bleko.
- 7) Komenco de utopio / r : Kia sablej(o) !
- 8) Lerneja imperativo.
- 9) r : Kovri, kaŝi / r : Nutra fluaĵ(o).
- 10) Anestezisto.

D-ro BERTHONNEAU.

Solvoj de la n° 118a:

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
I	F	I	Ŝ	K	U	L	T	U	R	O
II	A	L	T	E	R	N	A	T	O	R
III	R	E	E		B	E	L	E	T	E
IV	M	A	R	T		O	I	R	O	L
V	i		N	i	A		S	A	N	T
VI	S	R	O	N	T	O	M		D	A
VII	T	E		T	O		A	K	O	M
VIII	i	G	i	i	M	E	N	A		B
IX	N	O	S	L	E	N		P	L	V
X	O	S	T	O	C	I	K	A	T	R

Sloganoj:

Pli facile venos velka vento ol la verda venko.
Ne venos la fina konkero nur per kanto de "La Espero"
Li jam posedas PIV-on, sed ankoraŭ ne akuzativon.
Sen la verda literaturo, griza estos la futuro.
Vivu la stel', vivu la verda stel'
sed por la nokto estu preta kandelo!
Inter stelo kaj ŝtelo estas pli ol nur ĉapelo.

→ L I M D A T O
por la n° 120a;
la 28a de Marto ←

SFS ĉe J. Hénin
Rte de Montcayroux
48500 La Canourgue
66-32-86-36

KELKAJ VORTOJ DE MARK TWAIN (Tradukis C. Boumal)

- VIRTO : Tre belas esti mem virtema, sed ankoraŭ pli belas tion instrui al aliuloj kaj ...
...tio tiom pli facilas !
- AMIKECO : Amikeco estas afero tiom fortika, ke ĝi povus daŭri tutan vivon, se al ĝi oni ne vokus...kiam mankas mono !
- LITERATURO : Klasikaĵo estas io, kion ĉiuj deziras esti legintaj sed kion neniu deziras legi!
- KUTIMO : Kutimon oni ne forpelas ĝin ĵetante tra l'fenestro. Necesas, ke ĝi malsupreniru ŝtupon post ŝtupo.
- PRI ĜOJO KAJ ĈAGRENO : Ĉagreno ja povas memsufiĉi, sed, por plene eltiri la kvintecon de ĝojo, necesas ĝin partigi kun iu.
- PRI FI-SONAJ VORTOJ : Mark Twain kutimis sakri. Kaj tio kaŭzis ĉagrenon ĉe l'edzino. Iun tagon, post kiam li forsakris la ĉielon pro vundeto dum razado, Sinjorino Twain laŭvorte ripetis la ĵus elbuŝitajn malbenojn. Silente, la verkisto alrigardis ŝin dum momento, kaj diris : "La vortojn vi ja bone diris, kara, sed ankoraŭ mankas la ĝusta tono !"
- LA FINA VORTO : Ni strebu vivi tiamaniere, ke post nia forpasiĝo la enterigisto mem plorados dum tiu nia lasta vojaĝo !

(Eltiraĵo el la belga revuo "L'évènement")

*